

Carl Riedel,  
Venu, paŝtistoj

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Venu, paŝtistoj,  
Vi homoj al ni!  
Venu kaj vidu  
La filon de Di'!  
Kristo hodiaŭ  
Por vi naskiĝis,  
Via Savanto  
Li elektiĝis.  
|: Ne timu vi! :|

Venu rigardi  
Vi tion kun ni,  
Kion promesis  
Ĉiel-melodi'!  
Kion vi trovos.  
Ni diskonigu,  
Kaj la Sinjoron  
Ni honorigu!  
|: Haleluja! :|

Estas ĝojego  
Por la paŝtistar',  
La sciigaĵo  
De la anĝelar':  
Inter la homoj  
Nun iĝu paco  
Kaj sur la tero  
La Dia graco.  
|: Al Di' honor! :|

*Traduko de la Germana poemo "Kommet, ihr Hirten" de CARL RIEDEL (\*1827-10.05 – †1888-06-03) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04) en 1982.*

MR-014-3 / Arg-565-1140 (2010-09-20 10:01:32)

La muziknotojn vidu jen: [http://www.lieder-archiv.de/lieder/show\\_song.php?ix=200038](http://www.lieder-archiv.de/lieder/show_song.php?ix=200038).